









Uluru, en la centro de Aŭstralio



# Esperanto sub la Suda Kruco

Septembro-Oktobro 2002  
Numero 59 (vol. 10, no. 5)



ISSN 1039-9380

# Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj  
Numero 59 (volumo 10, numero 5), Septembro-Oktobro 2002

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)

## Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,  
143 Lawson St, Redfern, NSW 2016,  
Aŭstralio. E-poŝte:

[libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

## Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road,  
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:

[hazgreen@twmba.net](mailto:hazgreen@twmba.net)

## SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org); vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

## La kovrilbildo:

Uluruo, la plej granda monolito en la mondo, havas cirkonferencon de 9,4km, alton de 345m, estas 3,6km longa kaj 2km larĝa.

## EN ĈI TIU NUMERO

### Artikoloj:

La uzoj de ruzoj (Arturo Mortimer).....	3
Du poemetoj.....	5
Konu viajn gesamideanojn: Eunice Graham (interv. Terry Manley).....	9
Kiel allogi la gejunulojn (Daphne Lawless).....	11
El la sekretariejo.....	13
Nia konkurso; serioza enketo.....	18
La 1-a Monda Civila Socia Forumo (Bessie Schadee).....	19
Neologismoj (Kalocsay + Waring- hien).....	20
Skribas la legantoj (Marcel Leere- veld).....	21
Nekrologo: Ruth Tumman.....	24
Nekrologo: Dudley Parkinson.....	24
Multaj Vortoj!.....	26
Interrete.....	26
El la regionoj.....	28
<i>Ollo Bokserp</i> .....	30

### Recenzoj:

<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (rec. Debra McCarney).....	6
<a href="http://www.cursodeesperanto.com.br">www.cursodeesperanto.com.br</a> (rec. Vera Payne).....	6
<i>Vortoj kun flugiloj</i> (rec. (db)).....	8
<i>La bahaa kredo kaj Esperanto</i> ((db)).....	9

### For the Beginner:

What is an “Official Word?” ((db)).....	14
“False Friends” ((db)).....	15

*ESK* estas legebla per Interreto:

<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la novembra numero: 15 oktobro.

# La uzoj de ruzoj

de Arturo Mortimer

## Enkonduko:

De kelkaj jaroj, malgranda Adelajda grupo ĝuadas gravajn verkojn el la literaturo de Esperanto. La nuna verko estas la romano *Kredu min, sinjorino!* de Cezaro Rossetti<sup>1</sup>.

\*\*\*

Mia origina tasko estis skribi eseon por la grupo, kun la titolo: “La graveco de la ruzoj en ĉi tiu romano de Rossetti”. Iam, antaŭ multaj jaroj, mi havis la taskon skribi eseon kun simila titolo, tio estis: “The Importance of the Allegory in Edmund Spenser’s Poem *The Faerie Queen*”. Kaj mi tute ne povis skribi tiun eseon. La kialo estis ke mi ne povis imagi *The Faerie Queen* **sen** la alegorio!

Same ĉi tie. Sed eble mi povus doni alian ekzemplon. En la libro *Gamesmanship*<sup>2</sup> de Stephen Potter, la aŭtoro venas al sia ĉapitro pri la temo kriketo, kaj malesperas. Li diras: kiel mi povas trakti la temon “gamesmanship” en kriketo, kiam la tuta ludo estas tiel plenplena de ekzemploj de “gamesmanship”?

Simile, ŝajnas al mi, mia tasko skribi pri la multega nombro da ruzoj en la libro de Rossetti estas tro granda por mia kapablo. Precipe — kiel Rossetti mem konfesas — la libro estas tiel “zigzaga kaj epizoda”.

Sed, tamen, mi perceptas grandan kadron en la libro. La plej granda indiko, laŭ mia opinio, estas en la titolo mem. Laŭ mi, la titolo *Kredu min, Sinjorino!* indikas ke virinoj estas la

ĉefa celo por Rossetti.

Kial? Ĉar li klare observas la faktion ke virinoj aĉetas 80% de la varoj en la tuta mondo.

Sekve, la tuta libro fariĝas unu longa amindumado inter Rossetti kaj liaj sinjorinoj, la virinoj de Skotlando kaj Anglujo. Tial li uzas siajn multajn ruzojn kiel “hokojn” por allogi la scivolomon de virinoj.

Sed, dum li konsentas kun la aforismo de Frank Potter, ke “Klientoj ne aĉetas la varon, ili aĉetas la fabelon”, tamen Rossetti mem havas lojalecon al unu speciala varo, sia “senakva kuirilo”. Tiu lojaleco estas alia granda temo en la libro.

Do la vendado de la “senakva kuirilo” estas regula faktoro por Rossetti. Sed, kiam li komencis, kia terura tempo por la vendado de io ajn! Estis la senkompata Granda Depresio kiam nia kuraĝa heroo iris “konstante frapante” al la pordoj en la kruelaj skotaj stratoj. Kaj frap! frap! frap! al la vizaĝo estis la sola rekompenco por liaj klopodoj.

Tiam, post profunda pensado, li konstruis la pretekston ke li ne *zorgas* pri la vendado de sia ilo. Kaj li pantomimis tiun pretekston konstante por provoki virinan scivolemon.

Tiu gambito sukcesis, kaj nun la virino de la domo finfine permesis lin eniri preter ŝia terura pordo. Do, li rafinis aferojn. Li trovis “silentan helpanton”, kiu multe utilis al li. Ĉi tiu “helpanto” estis la salono de la kliento.

Kaŝe, li rigardis la salonon. Li kompilis rapidan psikologian profilon. Ĉu la salono de la kliento havas librojn

1. *Kredu min, sinjorino* de Cezaro Rossetti. 1a eldono: Heroldo de Esperanto, 1950.

2. “Nefidindeco, nehonesteco”. — ☞

pri religio, sano aŭ malsano, vojaĝoj, aŭ kio ajn? Ĉu la ĉambro estas malorda aŭ orda? Ĉio estis rapide taksata. Tiam li manipulis la konversacion al ĉi tiuj fakoj. Li ŝajnis esti simpatia. Kaj, ofte, li sukcesis vendi!

Unufoje, li vendis kuirilojn al du fratinoj. Unu estis ateista. La alia estis Kristana-Scienca! Tre plaĉis al li imagi la ŝokon kiam la fratinoj diskutis siajn novajn aparatojn kune!

Kaj li ofte fantazias pri la ŝoko de diversaj fulmokonsternitaj trompitoj. Alia ekzemplo: li ĝue imagas la mirregon de fera aŭtoposedanto kiam li revenis kaj trovis nur radon ĉenitan al la fosto!

Frue, lia malestimo por la amaso kreskis ĝis li fine konkludis ke:

Tia estas la amaso. Individuo estas tute racia, sed la amaso nur regas ŝafe, stulte, aŭ, minimume, senpense.

Sed li vidis avantaĝon ĉi tie. La ŝafeco kaj stulteco de la amaso estas granda ŝanco por vendi lian varon.

Do, li ĉesigis sian vendadon al la individuo kaj turnis sian atenton al la homaro en la pluralo — tio estas, li turnis sin al foiroj kaj grandvendejoj.

Kaj li sukcesis. Sed unu tagon la ŝancoj en foiroj komencis malaperi, kaj Cezaro faris seriozan diskuton kun sia edzino, Liza. Finfine, ili decidis allogi atenton al sia senakva kuirilo per alia, nova, ruzo. Liza fariĝis la mirinda MADAME ZILA! Kaj, uzante siajn “telepatiajn povojn”, ŝi klopodis allogi la scivolemon de la virinoj de Skotlando.

Precipe ŝi anoncis ke ŝi povas profeti la estontecon. Kaj ŝi ankaŭ uzis kelkajn teknikojn el astrologio, ludkartoj, manaŭgurado, tetasoj, ktp.

Ni konsideru nur unu laŭdiran lert-

econ: la telepation. Efektive, ŝi ne havis ian ajn telepatian povon. Sed Cezaro diris ke devas esti maniero *artifiki* telepatian prezentaĵon.

Do, li perfektigis diable lertan, sekretan kodon por mistifiki la popolon. Ŝajnas al Reto Rossetti ke Cezaro ofte preskaŭ “sorĉas la aŭskultantojn”, sed, vere, li ĉiam sukcesis per nekredible diligenta laboro. Ĉiu eta detalo devis esti perfekta. Li estis nelacigebla en la maniero per kiu li regis ĉion kaj ĉiun en la prezentaĵo. Kaj la virinoj svarmis en la Rossetti-halojn!

Alia grava faktoro en la karaktero de Cezaro estis lia profunda amo al la libereco. Li eskapis la servuton de sia unua okupo. Li ribelis kontraŭ kritikemaj skotaj dommastrinoj. Li ĝojis kiam la kuraĝa laboristo frapis — PAK! — la kruelan ĉefon de la malestiminda bando de tiranuloj.

Ĉi tie, la heroo de Cezaro sendube estis Martin Vernon. Kiel Petro en la “Vojaĝado” (dialogo en *Jen nia mondo* 2):

Li volus liberiĝi de ĉio. Li volus perdi sian identecon kaj vagi trans la landlimojn, tute sen valizoj, libere kiel birdo — veturi tra la tuta mondo!

Interne de la limoj de la libro, Martin ŝajnis sukcesi en sia ambicio por tuta libereco.

Ni ne estas certaj pri la sekva sorto de Martin Vernon, sed ni havas pli da informo pri la fina malgaja sorto de Cezaro.

Unue, oni devas agnoski ke, ĝis la alveno de la Dua Mondmilito, la kleraj ruzoj kaj gambitoj de Cezaro ĝuis grandan sukceson. Sed la milito tute ŝanĝis aferojn. La skota malamo al iu ajn kiu havas italan nomon estis nepacigebla. Reto Rossetti rakontis ke

alia frato “amputis ‘-etti’ el sia nomo kaj fariĝis pli skota ol la skotoj mem!”

Malamo pezis kontraŭ la malstreĉita atmosfero de fido necesa por ke la skota komunumo akceptu la Rossetti-ajn proponojn. La plej amataj sinjorinoj de Cezaro ne plu deziris aŭskulti lin, bedaŭrinde...

Sekve, Cezaro nepre fariĝis tre malgaja. La milita antipatio estis neregulebla problemo por li. Iam Reto observis ke Cezaro *vivis* por nesolveblaj problemoj, kiujn li *ĝue* solvis. Kaj nun li havis neblan problemon kaj li fariĝis mizerega.

Nuntempe oni mokas la ideon ke iu povas morti pro rompita koro. Sed en ĉi tiu kazo, povas esti... vere, kial ne?

Sed la vivo de Cezaro Rossetti ne estas malvenko. Male, lia vivo estas triumfo de la volo. Iam la amema kaj perfida Alec diris: “Kie estas volo, tie estas vojo”.

Pli nobla heroo, Hannibal, ankaŭ diris: “Se ne estas vojo, mi faros vojon!”

Kaj, laŭ mi, Rossetti mem estas sendube vera heroo. Oni devas konkludi ke lia nesklavigebla uzo de ruzoj formas la kronon de liaj atingoj. □

## Por kiu ne forgesas

de María de los Ángeles Caraballo Mauriz

Por kiu ne forgesas la mevojn  
Kaj dankas al la vento sian ekziston  
Por kiu amas la stelojn  
Kaj alproksimiĝas al tagiĝo kun sia  
poemo  
Por kiu protektas floron malgrandan  
Kaj en la maro trovas tutan sian belon

Para quién no olvida las gaviotas  
Y agradece al viento su presencia  
Para quien ama a la estrellas  
Y se acerca al alba con su poema,  
Para quién protege a una flor pequeña,  
Y en el mar encuentra toda su belleza

## Ĉar estas vi la poezio

de María de los Ángeles Caraballo Mauriz

Ĉar estas vi la poezio  
metas la belon en ĉiun tagon  
Ĉar estas vi la fantazio  
la revoj neniam perdas sian vivon  
Ĉar estas vi la melodio  
sonoj plaĉaj havas la ridon

Por ser tu la poesía  
pones lo bello en cada día  
Por ser tu la fantasía  
los sueños nunca pierden su vida  
Por ser tu la melodía  
sonidos gratos tienen la risa

## Novzelanda UEA-Peranto

24/7/ 2002

Mi nun transdonas la taskon de per-

anto de UEA kaj de diversaj gazetoj al  
S-ro G. David Dewar; 4 Harlech Mews,  
Avonside, Christchurch 8004;  
[gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz)

Informas Gwenda Sutton

## Recenzas Debra Mc Carney

**Boris Kolker:** *Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2002. 279 p. 14.5x21 cm.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

### Vojaĝu en Esperanto-lando kun ni!

Mi ĉiam antaŭĝuas viziton al mia Esperanto-klubo. La klubanoj venas el tre diversaj landoj kaj ĉiu vizito donas la eblecon lerni multon pri Esperantaj verkoj, gramatikaj punktoj kaj la historio de la monda Esperanta movado. Gastoj estas bonvenaj kaj ofte distras nin per interesaj kaj spritaj prelegoj pri siaj landoj kaj kulturoj. Tamen vere, la plej bona afero el ĉiuj estas, ke mi povas ĉeesti mian klubon kiam ajn kaj kiel ofte mi volas ... ĉar mia klubo estas la internacia virtuala klubo gvidata de akademiano Boris Kolker. La klubaj kunvenoj aperas en la paĝoj de la lastatempe eldonita libro – *Vojaĝo en Esperanto-lando*, la dua eldono, verkita de Boris Kolker.

Per ĉi tiu libro eĉ la plej izolita esperantisto povas ĝui la internacian amikecon de Esperantujo. Kompreneble, por pleje plibonigi sian konon de Esperantaj temoj, oni ankaŭ devas studi la prelegojn kaj tekstojn, kaj diligente plenumi la skribitajn ekzercojn ĉe la fino de ĉiu ĉapitro, sed la lernado estas ĝuebla sperto kaj Boris estas ege pacienca ĉiĉerono. (Mi mem atestas tion ĉar mi devas esti unu el la plej malrapidaj vojaĝantoj!) *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, dua eldono, haveblas nun ĉe la UEA libroservo. Petu ĝin de la AEA-libroservo kaj vojaĝu tra la mondo kun mi!

Fine, mi menciuj rektan kontribuon de aŭstralianoj al tiu unika lernolibro: Trevor Steele (ĝenerala Direktoro de UEA) eldonigis la libron; Kep Enderby (eksa Prezidanto de UEA) verkis por ĝi antaŭparolon; Don Broadribb publikigis en ĝi ĉarman tekston pri Aŭstralio kaj ankaŭ verkis la unuan recenzon por la revuo *Monato*. □

## Recenzas Vera Payne

La grupo Oceano, kiu planas allogi el la tiel nomata regiono adeptojn al Esperanto, petis min traduki en la indonezian, taŭĝan retkurson por homoj kiuj ne parolas la anglan. Laŭ S-ro Renato Corsetti, la plej bona kurso havebla estas:

[www.cursodeesperanto.com.br](http://www.cursodeesperanto.com.br)

Ĉiam preta sangi iomete por nia kara lingvo, mi konsentis, kvankam estas dek jaroj de kiam mi aktive parolis, skribis, instruis la lingvon de nia norda najbaro. Mia (misa) kompreno estis, ke ĉiu leciono bezonus tradukon de nur kelkaj malgrandaj alineoj. Porketoj ne flugas: entute, la 12 leci-

onoj okupas 72 A-4 paĝojn.

La unua travadŝtono por ĉiu esperantulo estas elŝuti (download) la kurson. Naŭ megabajtoj en mia komputilo bezonas ĉirkaŭ horon kaj duonon. Do, oni devas esti tre serioza lernonto por fari tiun unuan paŝon. Eble “prov-bajto” instigos.

La formato estas tre bela: 12 lecionoj, ĉiu kun 12 segmentoj, kun koloro kaj sono. Eĉâ-muziko! Ĝi estas interreaga lecionaro, kun kuraĝigaj komentoj kiaj “Bonege!” (aŭ “Neeeee!”). Mi tuj trovis trafan problemon: sen la supersignoj, mi ne povis plenumi la ekzercojn. Ĉiu vorto aŭ frazo ne korekte entajpita ree kaj ree aperas. Tio frustris min kaj ankaŭ formordis tempon. La kulpo estis tute mia. Antaŭ ol komenci la lecionojn, nepre legu “Settings” por akiri, tre facile, utiligon de la supersignoj. Legu ankaŭ “What is Esperanto” kaj la aliajn ofertitajn lokojn. Pro mia deziro rapidi haste, mi ne faris tion ĝis la fino de la kurso — je mia granda malavantaĝo.

Sciu ankaŭ, ke metante la muson sur la koloritan (esperantan) parton, vi ne nur povos vidi sed ankaŭ aŭdi la koncernan vorton aŭ frazon.

La voĉoj estas sufiĉe klaraj, kvankam ne tute kontentigaj. Laŭ la kolo-fono, la origina kurso sur kiu ĉi tiu estas bazita, venis el Kebekio; la aŭtoro, tradukinto, kontribuintoj kaj dankitoj ĉiuj posedas latinliteran nomon. Sed mi pensis, ke la sinjorino eble estas rusa, ĉar pli ofte la “e” sonis al miaj oreloj “i”. Do, anstataŭ “feŭdo”, “fiŭdo”; “neŭtrala — nitrала/nutrала”; “bela” — “bila”; “sukero” — “sukiro”, ktp. La “so” kaj “co” estas malfacilaj por distingi. Ĉu “selo” aŭ “celo”, “sia” aŭ “cia”? Por “cent” mi aŭdis “sen”. Ofte mi elektis

la malĝustan respondon, ĉar mi misaŭdis la vorton. “Ĝis” estas prononcata tre mallonge, kiel la angla “gist”. Oni aŭdas “Mi lav’s [lavas] la novajn tasojn” kaj “mi lavas la novan tas’n”!

Estas “stranglaj”<sup>1</sup> esprimoj. Mi iom hontas esti tiom kritikema, ĉar povas esti ke iu klerulo mokos mian tradukon, malgraŭ miaj plurmonataj streboj, kaj la kontrolo farita de indonezia amikino, sed estas miloj da parolantoj de la angla, kiu efektive nuntempe ja estas la internacia lingvo, do estas surprize ke oni verŝajne ne petis la helpon de angla kontrolisto. Kiu certe korektus: “je: indefinite preposition, used when no other preposition can precise the wanted meaning”. Estas multaj ekzemploj de malĝustaj esprimoj en la angla.

Ankaŭ de neoftaĵoj, kiaj “Primitive adverbs (adverbs which are not derived)”. Kelkaj el la klarigoj estas nenecese komplikitaj, ekz. “Ĉu...ĉu... shows possibilities among which the choice is indifferent, equal, free or uncertain”. Ĉu? Kial ne klarigi per la simpla “signifies whether...or...”?

Estas dusignifaj esprimoj: “I called him, not anybody else”; “He lives thriftily, however happily” (mankas alia komo post “however”, ĉar la traduko estas “Li vivas malriĉe, tamen feliĉe”); “to divorce (the man)” — “eksedziĝi”.

Por komencantoj de lingvo ne nur praktika sed ankaŭ laŭ kreo pli idealisma ol la aliaj, mi elektus poemon kiu havas aliajn sentojn ol: “If you loved me, oh greedy one, you would make me a queen”; “I believe you, but let there be gold in your wallet”; “I love you but I did not believe you were like

1. Valiza vorto: stranga + angla.—[db]

that!” Aliloke troviĝas esprimoj kiaj “The devil take you!” “Strike me dead if I am lying”.

Estas aludoj al fumado, kaj de viroj kaj de virinoj, fakte, en lernejo! (Dank’ al Diino Supre, ne troviĝas ia batado de hundoj.)

Estas negativaj tedaĵoj kiaj: “The store badly makes the small bread”. Eble “store” estas usona esprimo; ĉe ni, “shop” pli oftas. Simile: “A multitude of pedestrians walked on the sidewalks”. Kaj negativaj kuriozaĵoj: “Why are you running today like a poisoned mouse?” Imagu la eksciton kiam junulo legas: “I will wash the pen”.

Jen seksismoj. Oni parolas pri “slut, worthless woman”. Decas menciis ke ankaŭ troviĝas “dishonest businessman”. Tamen, “The greedy woman sits by the blue table”, dum “The generous man gave 100 kgms flour”. “The woman has dry cakes” kaj “The father wants to marry off his older daughter soon”. Ĉu ni troviĝas en ia trialanda vilaĝo?

Estas eraroj: “She trinkis tason...” = “He drank a cup...” “Kiam vi aĉetos panon?” = “When would you buy bread?” “The words beginning with Ki

can also introduce sentences without interrogative sense” — Ne tute ĝusta: “phrases” kaj “clauses” jes, sed ne “sentences”. “My friends have a paper” = “Miaj amikoj havas paperon”. “La knaboj estas grandaj” = “The boys are great”. “Eksfianĉo” = “ex boyfriend”. “Oferis kafon” — “offered coffee”.

La kurso ampleksas iom tro. Estante por komencantoj, ĝi bezonis nur simple, kaj kiel eble plej moderne, enkonduki la 16 gramatikajn leĝojn, por akriĝi la apetiton de la nova lernanto.

Por progresintoj, ĝi estas tre bona lecionaro, kaj mi urĝas ĉiun Esperanto-klubon kiu posedas komputilon, elŝuti kaj reklami ĝin al siaj anoj. Kompreneble, la samo veras por ĉiu individuo kiu havas la tempon kaj emon pliperfektigi sian scipovon pere de ĉi tiu relative nova ludilo.

Fine, por ridetigi vin, kaj kun pardonpetoj al la aŭtoro, kun kies longega laborado mi konsentade “empatias”: “To contact the author: The author would like to receive comments, suggestions and bug reports for this program. Although he doesn’t intent to respond the messages...”

Vivu Esperanto!

□

## Recenzas via Redaktoro

**Ralph Harry** (red.): *Vortoj kun flugiloj — citaĵoj el la tuta mondo*. Dua eldono: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 2002. 106p., perglue broŝurita.

Takso: 🍷🍷🍷

Granda nombro da citaĵoj, aranĝitaj laŭ aŭtoro. Preskaŭ ĉiu citaĵo aperas unue en sia origina teksto, poste en es-

peranta traduko (por kelkaj citaĵoj mankas la originlingva teksto). Kiam la citaĵo estis parto de tradukita verko eldonita en Esperanto, la teksto kutime estas el tiu traduko. Kiam tio ne troveblis, Ralph Harry mem tradukis la citaĵon, eventuale el anglalingva versio. Malgranda indekso indikas la



pozicion de tiatema citaĵo en la libro. Ekzemple, ĉe la temo “beleco” oni trovas ke la temo troviĝas en citaĵo numero 5 sur paĝo 83:

*Ĉu mi komparu vin al tag’ somera?  
Vi estas ja pli bela kaj serena:*

Kun indiko ke tio estas traduko de linioj de Ŝekspiro: “Shall I compare thee to a summer’s day?/Thou art more lovely and more temperate”, laŭ traduko farita de Rossetti, publikigita en *Angla antologio*.

Kvankam tre nekompleta, kaj malgraŭ la manko de plena indekso, ĉi tiu libro meritas pozicion en la libraroj de

verkistoj kaj de literaturamantoj, kiuj deziras serĉi la originon de bone konata citaĵo, aŭ trovi indan citaĵon por prezenti sian penson. Gratulojn al Ralph pro ĉi tiu lia kontribuo al nia konsultlibraro.

**Paul Desailly:** *La baha kredoj kaj Esperanto realigas la mondan pacon*. Private eldonita, 2002. 146 A4-dimensiaj paĝoj ilustritaj, broŝuritaĵo. Prezo: \$20. (Ŝajne aĉetebla ĉe la aŭtoro).

Plejparte temas pri citaĵoj el leteroj kaj verkoj de bahaistaj kaj esperantistaj eminentuloj, kiujn akompanas komentoj de la aŭtoro. □

## *Konu viajn gesamideanojn*

### Eunice Graham

intervjuas Terry Manley

*Eunice Graham* estas aktivulo de la Esperanto-movado en Sidnejo, precipe Manlio, de multaj jaroj. Mi iris kelkfoje al la jara pikniko en ŝia bela ĝardeno apud Manlio kaj helpis ŝin iomete kiam ŝi aranĝis Zamenhof-feston en la Sidneja klubo. Krom tiuj aferoj, de multaj jaroj Eunice estras la senpagan korespondan kurson, kaj sendube helpas allogi novajn membrojn kaj reklami pri Esperanto. Dankon Eunice pro viaj jaroj da laboro kaj la respondoj al miaj demandoj. Kiel montrate en la foto, Eunice estas amanto de la natura medio. (Eunice deĵoras en loka medio-protekta grupo). Estas taŭge ke ŝi aperas apud bela rivero.

*Mi scias ke vi estas anglo, Eunice.  
Kiam vi alvenis al Aŭstralio?*

Mi kun mia edzo kaj juna filo venis ĉi tien en 1949.

*Kial vi enmigris Aŭstralion?*

La Aŭstralio registraro starigis grandan kampanjon en Britio por gajni enmigrantojn kaj tio allogis mian edzon.

*Ĉu vi sentis ke vi alvenis al fremda lando aŭ ke multo similis al la hejmlando?*

Ŝajnas al mi ke mi neniam sentis min kiel fremdulon ĉi tie. La diferenco inter la vivo en Aŭstralio kaj Britio ŝajnas ne pli ol la diferenco inter diversaj lokoj en Britio.

*Kie vi komence loĝis en Aŭstralio?*

Ni komence loĝis en Novkastelo poste Melburno kaj pli poste Adelajdo.



Eunice Graham

Post proksimume kvar jaroj ni venis al Sidnejo.

*Vi alvenis al anglolingva lando. Kiel vi elektis lerni Esperanton?*

En la loka ĵurnalo mi legis pri kursoj kiuj komenciĝos en Manlio kaj mi interesiĝis. Mi jam sciis pri Esperanto sed mi forgesas de kie.

*Mi scias ke la Manlia grupo estas vigla, humurama grupo. Ĉu ĝi origine estis grupo kun enmigrintoj, Aŭstralianoj, aŭ miksaĵo?*

Miksaĵo.

*En la 1950aj jaroj enmigrintoj envenis plejparte el Eŭropo. Ĉu tial ili konis Esperanton?*

Mi ĉiam trovis ke Eŭropanoj jam aŭdis pri Esperanto.

*Ĉu vi opinias ke Esperanto helpas enmigrintojn pri la lernado de la angla?*

Lerni Esperanton helpas pri la lernado de iu ajn lingvo.

*Nuntempe enmigrintoj envenas el mezorientaj landoj, kie oni ne multe scias pri Esperanto. Ĉu tio malhelpas la varbon de novaj enmigrintoj?*

Tiuj enmigrintoj havas multajn tre gravajn kaj urgajn problemojn por pripensi. Lerni la anglan estas la unua.

*Kiaj grupoj estas la plej gravaj por allogi al la movado en NSK?*

Allogi instruistojn kaj junulojn ŝajnas grave.

*De jaroj vi prizorgas la senkoston korespondan kurson por komencantoj. Proksimume kiom aliĝis al la kurso?*

Proksimume 200, sed dum la lastaj du jaroj ne multaj. Antaŭe oni distribuadis pli da lecionoj en taŭgaj lokoj.

*Ĉu vi havas scion pri la aĝoj de tiuj?*

Mi opinias ke la aĝoj estas diversaj.

*Averaĝe kiom da lecionoj ili faras?*

El la 200 kiuj faris la unuan lecionon, preskaŭ duono ne daŭrigis la kurson. Tamen ili lernis iomete pri Esperanto.

*Kiom finis la lecionojn?*

30 finis la 12 lecionojn kaj multaj preskaŭ finis aŭ faris pli ol duonon de la lecionoj. Multaj el tiuj tre bone lernis.

*Nun ŝajnas ke estas malmultaj aktivuloj en la Sidneja regiono. Ĉu vi memoras similan cirkonstancon dum via tempo ĉi tie?*

Kiam en 1960 mi aliĝis al la Manlia klubo estis multaj tre aktivaj, entuziasmaj Esperantistoj en Manlio kaj Sidnejo sed iom post iom ili malaperis; kaj allogi novajn membrojn iĝis pli kaj pli malfacile. Ĉiuj nuntempe tre peze laboras kaj ne havas tempon por flankokupoj.

*Kiaj estas la solvendaj problemoj por la loka klubo kaj Federacio?*

Reklamado, eble. Distribui flugfoliojn kaj senpagajn lecionojn kaj en la urboj kaj en kamparaj lokoj povos esti bona malmultkosta metodo. Interreto tre gravas.

*Vi kaj aliaj multe strebis por antaŭenigi Esperanton en Sidnejo. Kiuj estis la plej sukcesaj rimedoj kiujn vi uzis?*

Ni havas multajn fidelajn anojn en Manlio kaj ni regule kunvenas kaj bonvenigas vizitantojn en allogaj lokoj. La Sabatmatena kunveno por kofrinki en bona restaŭracio tre sukcesas. Tamen ni ne nun instruas klasojn sed rekomendas la senpagajn lecionojn aŭ la korespondan kurson de AEA kun helpo kaj konversacio dum kunvenoj. Ni ĉiam metas senpagajn anoncojn en loka ĵurnalo pri la sabata kunveno. Ankaŭ ni rekomendas lerni per Interreto .

*Dankon Eunice pro viaj rektaj respon-*

*doj al miaj demandoj. Mi esperas ke iuj el la legantoj alprenos vian konsilon kaj distribuos la senpagajn lecionojn en sia loko. Ĉiuj pripensu kiel reklami en via najbarejo, ni petas.*

*Mi pli ofte rimarkas ke junuloj lernas per la reto. Matt Maguire komencis tiel kaj mi ricevis retmesaĝon de Jonathan en Novkastelo. Li informis min ke li starigis klubeton kun tri anoj en Novkastelo. Per la komputilo mi povis doni la li nomon de alia en Novkastelo. Mi scivolas kiom da aliaj lernas tiumaniere kaj kiel ni kontaktu ilin? Eble antaŭ la ekranoj en multaj lokoj estas jam multaj novaj amikoj sed ili parolas al amikoj en foraj landoj, ne al ni. Sed kial plendi? Ĉu tio ne estas la celo de Esperanto, skribi kaj paroli al alilingvuloj? Mi opinias ke estas grave havi vizaĝ-al-vizaĝan kontakton por ekzerci la parolatan lingvon.*

[El *Telopeo*] □

## La Esperanto-movado: kiel allogi la gejunulojn?

de Daphne Lawless

(prelego origine verkita por la Esperanto-Rondo de Wellington, Julio 2002)

Nu, tion oni ofte demandas al mi, kaj al Kelly. Mi devus diri unue ke mi mem lernis Esperanton antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj; sed mi nur vere interesiĝis pri la movado post kiam Kelly ankaŭ malkovris la riĉecon de la lingvo, kaj ankaŭ eklernis, antaŭ ĉirkaŭ unu jaro. Do, oni ja rajtus diri ke ni estas novaj entuziasmoj por la internacia lingvo — kaj, ja estas videble ke ni estas iomete malpli aĝaj ol la pliparto de la Esperantistoj en tiu ĉi lando! Do, mi supozas ke oni vere demandas: “Vi estas junulinoj. Kial

vi esperantistiĝis? Kaj kiel ni allogu aliajn gejunulojn al la movado?”

La simpla respondo al la dua demando estas: mi certe ne scias! Se mi scius, mi estus nun la ĉefo de granda kaj forta Esperanta junec-movado, kaj mi estus multe tro okupata por prelegi al vi hodiaŭ vespere! Sed mi ja rekonos ke estas tre grava demando. Do, ni iomete esploru la unuan demandon, por ke ni vidu ĉu tiel oni povos malkovri ion pri kial gejunuloj eble esperantistiĝas.

Unue, kompreneble, oni devas diri ke

Kelly kaj mi ne estas... “tipaj” gejunuloj! Krom la videblaĵo ke ni estas paro, ni estas ambaŭ tre bone edukaditaj; ni ambaŭ ŝatas nekutimaĵojn kiajn sciencfikcio kaj stranga muziko; ni estas idealistoj, al kiuj ne multe plaĉas la aktuala stato de la mondo; kaj ni estas... nu, la vorto angla estas “geeks”. Mi tradukas tion esperante tiel: obsedemuloj. Do, eble jen la kialoj por nia esperantiĝado. Nia obsedemeco donis al ni la paciencon por lerni lingvon kiu, kvankam ja facila, ne estas senpena, kaj ne proponas rekompencojn financojn kiel, ekzemple, lerni la ĉinan aŭ la japanan aŭ la germanan, ktp. Nia idealismeco nin igis pretaj pripensi la ekzistadon de la monda lingva problemo.

Kaj ni havas la sperton de interesiĝo pri aferoj kiujn la pliparto nek ŝatas nek mem komprenas! Do, pro tiuj faktoroj, eble ni estas “idealaj” kandidatoj por esperantiĝado!

Sed certe ne estas sufiĉe. Oni povas unue vidi ke, se la pliparto de la Esperanta movado estas obsedemuloj kaj nekutimuloj, tio *ne* allogos tiujn kiuj priskribus sin “normalaj”! Se ili kredas ke la rekompenco por lerni Esperanton estas ekpovi paroli al iu en Belorusio pri kiu rolulo de *Star Trek* estas la plej bona... nu, tio ne estas tre bona reklamo laŭ ili! (Tio, parenteze, estas kial la Klingona neniam iĝos vere populara lingvo!) Sekve: kelkfoje iuj diris al ni ke estas nia entuziasmo kaj obsedemo mem por Esperanto kiuj malallogas ilin.

Estas epoko kiam oni ne multe fidas al tiuj kiuj “kredas je io”; kvankam ĉiuj povas vidi ke la mondo havas grandajn problemojn, iu kiu pretendas havi solvon por tiuj problemoj estas “videble” frenezulo, aŭ eĉ krimulo.

Estas stranga paradokso; por allogi la fidon de la pliparto, ni ŝajne devus

ŝajnigi ke ni estas pli-malpli indiferentaj pri nia solvo.

Sed se oni volas ke ni diru: Kion ŝatas gejunuloj? Kion devus do la Esperanta movado proponi por allogi ilin? ... malfeliĉe, ni certe havas neniun ideon. Oni nur povas diri je kio ili ne fidis. Ili ne fidis al io kies anoj ŝajnas tro entuziasmaj; eble estas kulto! Ili ne fidis al io pri kio ili ne antaŭe aŭdis en la amas-komunikuloj. La averaĝaj gejunuloj vere ne volas ŝajni “strangaj” al siaj egaluloj; la risiko de ostracismo estas tro granda. Do... tiuj kiuj ja partoprenis en la lingva-movado estos tiuj kiuj ja scias sin strangaj, kaj indiferentas al la opinioj de la pliparto. Eble tio estu nia celo, por allogi tiajn homojn al la movado.

Sed mi ja kredas ke la demando pri “la Movado” malutilas. Certe estas *multe* pli grave ke Esperanto estu uzata, kaj iĝu pli utila, ol ke pli da homoj iru al ĉi-tiaj kunvenoj kaj pagu kotizojn! Eble la vero estas ke la “movado” ĉiam allogas nur la obsedemulojn, la strangulojn, la idealistojn kaj la pli-ol-kutime klerajn ulojn; almenaŭ, tio temas pri la “movado”. La gejunuloj hodiaŭaj nek tre fidis al movadoj, nek havas sufiĉe da tempo por partopreni. Ili estas tro okupataj — la vivo por la hodiaŭaj gejunuloj estas multe pli plena ol pastintece. Sed... mi ja kredas ke ni povas popularigi nian lingvon inter tiuj kiuj uzas Interreton por komuniki al uloj kaj inoj en strangaj foraj landoj.

La unua celo, laŭ mi, estu prui per ekzemploj ke Esperanto *ne* estas mortinta, kaj *ja* estas utila. Kiaj ekzemploj? Ĉefe, la ekzemploj de kontaktoj pere de Interreto. La gejunuloj de hodiaŭ multe pli verŝajne havas amikojn en aliaj landoj kiujn ili renkontis rete; estas multe pli simple hodiaŭ ol la malnova kutimo de “plum-amikoj”! Do, nia movado, pere de bela, alloga retejo, devus

proponi al surretaj gejunuloj tiel: “Rigardu, vi verŝajne parolas rete nur al tiuj kiuj parolas la anglan: britoj, aŭstralianoj, usonanoj. Certe iliaj landoj estas malsimilaj kaj do interesaj al la nia; sed ĉar ni havas saman denasklingvon, multo estas sama. Ni aŭskultas la saman popmuzikon, rigardas la samajn televid-programojn... ĉu ne estus tre interese interparoli kun junuloj de vere diferencaj landoj — tiuj kie oni ne parolas la anglan?”

Sed, kiel interparoli? Estas tre malfacile lerni novan lingvon sufiĉe bone por konversacii — kaj se oni lernas la francan, ne utilas por interparoli kun germanoj, vjetnamanoj, kenjanoj, ktp... Se vi volas renkonti surrete ulojn kaj inojn de vere ĉiu parto de la globo, oni devus lerni simplan lingvon kiun oni povas uzi ĉie. Ĝi nomiĝas... Esperanto. Ne, ĝi ne estas mortinta!” Kaj tiel plu.

Oni povas reklami, ekzemple, ke al nia lasta Kongreso iris instruistino el Serbujo kiu ne parolas la anglan; tamen, per Esperanto ŝi povas konversacii flue kaj bele kun ĉiuj el ni. Ĉu tio ne allogus la intereson de, ekzemple, tiuj kiuj lernis lerneje pri la milito en eks-Jugoslavio, kaj vere ŝatas interparoli kun iu kiu estis tie?

Do: en tiu epoko kiam Interreto, kaj komunikado kun alilandanoj, vere populariĝas, tie estas la ĝusta loko por pliigi la uzadon de nia neŭtrala, simpla internacia lingvo. Mi ja kredas ke ni povos popularigi Esperanton inter gejunuloj per montri ĝian utilecon por e-poŝto, ret-foliumado, “babilejoj”, ktp. Sed ĉu ni ja povas popularigi la *movadon* inter la okupategaj gejunuloj de hodiaŭ?

Tio, laŭ mi, estus multe pli malfacila. □

---

## El la Sekretariejo

**Nova adresaro:** La nova *Adresaro* aperos kun la marto-aprila numero 2003 de *ĜK* kun, inter aliaj, la nomoj de la nova estaro por 2003. La sekretario de AEA, John Gallagher, akceptos adresojn por 2002, kaj poste donos ilin al Ronald Gates, kiu verkos la venontan adresaron. Bonvolu sendi ilin antaŭ la decembra limdato, por ke la *Adresaro* estu laŭeble plej ĝusta.

Ĉiuj provincaj reprezentantoj en la estraro pludonu ĉi tiun peton al la sekretarioj de la Esperanto-federacioj kaj de ĉiuj kluboj, por ke ni ricevu la informon antaŭ decembro.

**Provizora tagordo de la Ordinara Ĝenerala Jarkunveno** (5-17 januaro 2003) en International House, University of Melbourne, 241 Royal Parade,

Parkville Vic 3052:

1. Ĉeestantoj/pardonpetoj
2. Protokolo de la jarkunveno 2002 (jam aperigita en *ĜK* Marto/Aprilo 2002)
3. Jarraporto
4. Financa raporto
5. Elektaj — prezidanto kaj estraro (nomoj de nomumotoj al la Sekretario antaŭ la 1a de decembro)
6. Aferoj diskutindaj, inkl. 20an Sommerkursaron 2004
7. Proksimuma dato de la Ordinara Ĝenerala Jarkunveno 2004

Se vi, la membraro, havas ion diskutindan, bonvolu kontakti min ĉe:

[abcetc@ozemail.com.au](mailto:abcetc@ozemail.com.au)

John Gallagher, 81 Lalla Road, Lilydale Tas 7268. ☎ + 61 3 6395 1167 □

# For the Beginner

Word of the month:

## **krozilo**

This word is Internet language for “a browser”, which, in turn, is a program for using the Internet. The English word, of course, is based on the notion that people “browse” the Internet, looking for things that interest them. The Esperanto word comes from the word *krozi* which means “to cruise”, and thus is a sea metaphor, as is the popular image of “surfing the Internet”.

*Kroziloj* (browsers) nowadays are all you actually need for all your Internet work, though for many years other programs were also needed. At present, the browsers are able to access more or less all Internet sites<sup>1</sup>, and also incorporate e-mail abilities. Even though many people still prefer to use separate e-mail programs, such as OUTLOOK EXPRESS, EUDORA, Macintosh OS X's MAIL, and a vast number of others, the popular browsers also provide for e-mail. All the browsers allow you to access Internet companies' “Net-mail” facilities; and the most popular browsers have their own inbuilt e-mail facility, such as the e-mail facilities in the Windows and Macintosh version of OPERA and MOZILLA, and in the Windows version of INTERNET EXPLORER (though not the Macintosh version), and others. (Interestingly, some word processing programs also include an e-mail facility right in the program itself; for example, the Windows version of MICROSOFT WORD, and several of the Macintosh OS X capable word processing programs.)

## What is an “official” word?

by Donald Broadribb

When the Esperanto project was first published, in 1887, by L. L. Zamenhof, the original book included a vocabulary list. In the following years many dictionaries were compiled, and in 1905 the book *Fundamento de Esperanto* was published. This book included a couple of thousand Esperanto “roots” or “stems” (such as vid-, parol-, etc.) with equivalents in five languages (French, English, German, Polish, and Russian), which together form the agreed basic vocabulary of the language. A language committee (LINGVA KOMITATO) was also established in that year, and its subcommittee, the Esperanto Academy (AKADEMIO DE ESPERANTO), was entrusted with compiling further official vocabulary lists to supplement that in the *Fundamento*. To date, eight such “Officialaj Additions” (OFICIALAJ ALDONOJ) have been published, the most recent in 1975. Whether or not a further 9th OFICIALA ALDONO needs to be compiled is still under discus-

---

1. Exceptions are some confidential sites; and a handful of libraries whose catalogues were made available on the Internet many years ago using the Telnet system, and which have never been transferred to the present day normal systems.

sion.

It was never intended that these “official” lists constitute the entire vocabulary of the language, but that they serve as a base for the compilation of dictionaries and as an agreed basic vocabulary for writing textbooks and other aids for Esperanto students.

At present the total number of word roots/stems in the “Official” lists, including those in the *Fundamento*, stands at just over 5100. The precise number depends on whether various individual items (particularly those making use of the Esperanto suffix *um*) are counted separately.

It is at present difficult to obtain a full list of the “Official” word roots/stems. The all-Esperanto dictionary *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (and its 1930/1934 predecessor *Plena Vortaro de Esperanto*) attempted to specify which of its listings are “official”, but misprints and various lexicographical matters need to be taken into consideration.

To a large extent the *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, first published in 1970 and just republished in a thoroughly revised second edition in 2002, has become the major touchstone for identifying the generally accepted form of Esperanto words and their usage, though — as with any language — there can be, and is, much debate about individual items and points.

Most Esperanto users would be astonished to know that many words for everyday needs have never reached “official” status, for example *agariko* (mushroom), *inkludi* (to include), *faŝismo* (fascism), *gazono* (lawn), *greso* (grass), *hidranto* (hydrant), *lunĉo* (lunch), *magnetofono* (tape recorder), *majonezo* (mayonnaise), *mandarino* (mandarin [fruit]), *Marso* (Mars), *mesaĝo* (message), *pagano* (pagan), *pingveno* (penguin), *pulso* (pulse), — which is not to say that they may not be used, but merely that they are not in the most basic vocabulary given official recognition.

## *Falsaj Amikoj*

“False friends” are words which look almost exactly like ordinary English words, but which have a very different meaning. Esperanto students are especially prone to becoming their prey. Because so very many Esperanto words not only look just like English words but have the same meaning too, it is easy for a few intruders to slip by without being caught by the unwary.

Every language has its own set of “false friends”, as you will soon discover when you look at mistakes people from other cultures make.

For instance, has a Russian ever told you he finds your behaviour is not at all “convenient”? He meant to say “not at all suitable”. This is because in Russian a word which looks very similar to the English word “convenient” actually means “proper, suitable”, and Russians often mistakenly assume the English word will

mean this too.

On the other hand, have you ever heard a Spanish friend tell you he finds a particular girl very “sympathetic”? He meant to say “pretty”, because that is what the Spanish word “simpática” is usually used to mean.

On the other hand, I once knew a Mexican girl who told me how she was very “constipated”. It turned out she merely meant she had a hard cold; in Spanish “constipado” has this special meaning; she did not realise that in English the word means something else.

There are a number of words in Esperanto that can also confuse the unwary. Here are some of the Esperanto terms that most easily trip up English speakers:

**afekti**//*affect*: English speakers often confuse the English term “to affect” and the Esperanto term “afekti”. In English, to “affect” someone means to make them undergo something: “this affected me badly” = “the effect of this was bad for me”. In Esperanto, *afekti* means something very different; it means “to pretend”: *li afektis interesiĝon* = “he pretended to be interested”.

**aktuala**//*actual*: one of the most common confusions can really wreak havoc if you are not careful. *Mia aktuala reprezentanto* does not mean “my *actual* representative” but merely “my *current* representative”. *Aktuala*, you see, refers to time, not to authenticity.

**asigni**//*assign*: If someone sometime tells you you are about to receive an *asignon*, you may need to feel a bit anxious. It means you are about to receive a “summons” to go to court.

**ĉamo**//*shammy*. I’d advise you not to wipe down your car with a *ĉamo*, because the creature will probably squirm too much and, if squeezed, leave a lot of blood on the side of your car. It would be better to use a *ŝamo*, which might either be made from the *ĉamo*’s skin, or from some imitation, and is very good for car washing. (The distinction between *ĉamo* and *ŝamo* is an interesting one in Esperanto, because the same original word came into Esperanto with two spellings to indicate two aspects of it. You’ll find another, maybe more useful, example on the next page, when we come to discuss “cotton”.)

**demand**//*demand*: If someone speaks to you about their *demando*, it has nothing to do with their demanding something. It merely means they want to ask you a question.

**direkti**//*direct*: when someone asks you about the most “direct” way to a particular place, they will speak about the *plej rekta vojo*. On the other hand, if they ask you to direct their play, they will ask you to *direkti teatraĵon*.

**drinki**//*drink*: if for any reason you need, or wish, to avoid alcohol, it is best that you turn down a suggestion *drinki* with someone. *Drinkado* by definition includes alcohol; if you prefer water or orange juice, you must simply *trinki*.

**efektiva**//*effective*: This can you get you into real (*efektiva*) trouble! If you want to be “effective” as well as real, you need to be *efika*.



**eventuala**//*eventual*: This can be a real source of misunderstanding, so you need to be extremely careful with it. *Eventuala* means if something occurs, not when something occurs. So *via eventuala malsukceso* does not mean that you will fail, only that you *might* fail. A subtle but very important distinction.

**fartol**//*fart*: No doubt someone by now has thought they were being very original when speaking to you about your *farto* and seeing you blush. The less infantile among us know that your *farto* means your “state of health” and nothing at all to do with whether your *furzoj* are loud and smelly.

**impresol**//*impress*: When someone wants to “impress” you by bragging to you about all their many mighty accomplishments, he sets out to *imponi vin*. If, instead, you just happen to like him, you simply have a good *impreson* of him.

**konvena**//*convenient*: Like the Russian already mentioned, the English speaker needs to keep these words separate. In this case, Esperanto takes the Russian’s side. A *konvena vesto* means “suitable clothing”, and says nothing about how “convenient” it may be.


**kopii**//*copy*: On occasion, confusing these words could get you into a costly situation. The original edition of a Guttenberg Bible came out in quite a lot of copies (*ekzempleroj*), but forgeries (*kopioj*) are by no means uncommon on the antiques market. If someone offers to sell you a *kopion* of something, you need to beware, an *ekzemplero* of an original edition may be very valuable, but a simple *kopio* is likely to be worthless, and may also be of low quality as well. In art, only one *ekzemplero* of an original painting is usually made; numbers of *kopioj* of it may be passed off as purportedly authentic.

When it comes to this magazine, *ESK*, we print hundreds of *ekzempleroj*, and we make no pretence that they have high artistic value; but a *kopio* of one of the magazines would be a photostat, and probably be hard to read — at least the pictures would not come out recognisable. I think you would prefer an *ekzemplero* of a book or magazine, not a mere *kopio*.

**Kotonol**//*cotton*: If you decide to wear clothes made of *kotono*, you will make a very strange impression, because *kotono* is a kind of plant. On the other hand, if your socks are made of *katuno* you will probably find them very good, since *katuno* is cotton cloth.

**originala**//*original*: With this word the problem is the double meaning of the word “original” in English. *Mia originala opinio estis...* means “my highly personal opinion was...”. To mean “my original thought, which I later changed” you need to say *mia origina penso, kiun mi poste ŝanĝis*.

**petrolol**//*petrol*: Most of us know that in Esperanto what we put into our cars to make them run is *benzino*; Esperanto oil companies refine *petrolo* (petroleum) in order to make their *benzinon*.

**seruro**//*lock*: Not such a problem if we distinguish between what we do and what objects are involved. Our action is to *ŝlosi* the door, and the thing in or on the door is a *seruro*. We may set about to *malŝlosi* the door using either a *ŝlosilon* if a key-type of lock is involved, or a *kodon* if it’s a combination lock. — 

## Nia konkurso

*signature* subskribaĵo

<i>handwrite</i> man-	<b>skrib</b>	-ilo <i>writing implement</i>
<i>typewrite</i> maŝin-		-aĵo <i>a writing</i>
<i>sign</i> sub-		-anto <i>a writer</i>
<i>something handwritten</i>	manskribaĵo	

La tasko estas trovi laŭeble plej grandan nombron da vortoj konstrueblaj, en kiuj troviĝas la radiko **skrib**. Ĉiun vorton devas akompani anglalingva traduko. Oni rajtas uzi laŭplaĉe tiom da kunradikoj kaj afiksoj, kiom oni deziras, nur kondiĉe ke ekzistas reale uzebla anglalingva traduko. Ekzemple: *kolorskribaĵaro* = “manuscripts written in colour” estas akceptebla, sed verŝajne **ne fiĝardenseĝsubskribaĉistaĵo** ( ? = “a horrible signature of a person who professionally signs nasty names on the bottoms of garden chairs”). Ĉiu vorto devas finiĝi per *-a*, *-e*, *-i*, *-o*, aŭ *-u*. Nur unu gramatika formo de ĉiu vorto estas akceptebla. (Do, ekzemple, se *perskribe*, do ne ankaŭ *perskriba*.)

Vi ricevos unu poenton por ĉiu vorto.

Via plej longa vorto ricevos 5 poentojn.

Krome, la plej komika akceptebla vorto sendita por la konkurso ricevos 50 ekstrajn poentojn.

Venkos en la konkurso tiu persono kiu gajnis la plej multajn poentojn per siaj vortoj.

Konkursoj devos atingi la redaktoron plej malfrue la 15an de oktobro.

Sendu e-poŝte al: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)

aŭ per normala poŝto al:

Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio.

□

## Serioza enketo

**varma:** Ekzistas konfuzo inter uzantoj de niaj vortaroj, pri la signifo de tiu vorto. Laŭ *PIV* p.1169 kaj laŭ *CEED* ĝi signifas “hot”. Laŭ la *Fundamento* kaj sur p.1170 de *PIV* ĝi signifas “warm”, kaj *varmega* = “hot”.

Laŭ viaj propraj uzo kaj kompreno, kion ĝi signifas?

Flankkomento: en la programo *Today*, en TV-kanalo 9, matene la 12an de aŭgusto, virino menciis “a steaming hot warm meat pie”. (Ŝajne ne ŝerce!)

Sendu viajn komentojn pri la esperanta termino al la redaktoro, ĉe [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org) aŭ Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio.

Estas unu simpla aparato por vidi tra muroj! Tio estas la fenestro !

# La 1-a Monda Civila Socia Forumo

(14-a ĝis 19-a de julio 2002 en Ĝenevo) kaj la rolo de la indiĝenaj popoloj en ĝi

Informas: Bessie Schadee, direktoro de Indiĝenaj Dialogoj

Dum la granda mondskala Kunveno de la Ne-Registaraj Organizoj (NRO, angle NGO) por la Jarmilo en septembro 2000, estis decidite kunveni en 2002 la reprezentantojn de NRO-j de la tuta mondo en Ĝenevo. Indiĝenaj Dialogoj (ID) partoprenis, ĉar pluraj el niaj ID-anoj ĉeestis. La semajno estis organizita de Mandat International, organizo kiu jam de jaroj helpas la indiĝenan mondon, kaj kiu venas ĉiujare al Ĝenevo por UN-sesioj pri homaj rajtoj de indiĝenaj popoloj.

Temis pri interesa kunveno. Mi vidis multe da indiĝenaj reprezentantoj el Sudameriko (ĉirkaŭ 20), estis kelkaj indiĝenoj el Usono kaj Kanado (fakte pli ol en Nov-Jorko dum la unua sesio de la Daŭra Forumo pri Indiĝenaj Aferoj en pasinta majo 2002), estis multaj (ĉirkaŭ 20) el Afriko kaj ĉirkaŭ 25 el Oriento, ĉirkaŭ 3 el Aŭstralio kaj pli-malpli 7 rusparolantaj indiĝenoj.

Multaj el ili uzis la okazon por kunveni kaj trakti indiĝenajn aferojn.

Samtempe okazis la kunveno pri la indiĝenaj infanoj, en kiu multe da indiĝenaj reprezentantinoj ankaŭ partoprenis, kaj tial ili vere devis kuri de tie aliloken. S-ino Mililani Trask, indiĝeno el Havajo kaj membro de la Daŭra Forumo, ĉeestis kaj partoprenis en multaj diskutoj, kie ŝi ege klare prezentis la situacion de la indiĝena mondo. Ŝi ankaŭ vere helpis pri la formulado de la rezultoj de la foruma laborgrupo koncerne la decidrajton pri si mem de la indiĝenaj popoloj (ni baldaŭ publikigos tion en nia TTT-ejo).

Ĉiutage okazis laborgrupoj pri

indiĝenaj temoj. Kaj ofte mi vidis nian membron de la ID-konsilo Rubén Órtiz, majao el Gvatemalo, sur la podio. Li estis elektita kiel kunordiganto de la sudamerikaj indiĝenaj organizoj, kaj estas nun ankaŭ membro de la Komitato de la Monda Civila Socia Forumo. Krom tio, li prezentis pri Ekoturismo kaj Etika Turismo. Kaj li menciis kaj klarigis pri Indiĝenaj Dialogoj, ĉar dum la unua ID-mondsкала kurso en Nederlando li unue aŭdis pri ekoturismo kaj povis paroli kun indiĝenaj kolegoj kaj nederlandaj fakulinoj de turismo. Nun en Gvatemalo komenciĝis granda projekto pri Agro-ekoturismo: ili faros programon por selektitaj turistoj (kiuj konsentas antaŭe pri reguloj kiel kondukti kun siaj gastigantoj) kaj komprenas la majaaĵn konon kaj agmanieron pri agrikulturo. Tiel al ili eblas ankaŭ ke la majaa agrikulturo daŭros kaj kros kroman monon. Ili fondis, dank'al subvencio donita de la gvatemala ŝtato, la organizon AGREOTOUR.

Fine de la Forumo okazis diskuto, ĉu la Forumo okazos denove (decidite estis ke jes): tie evidentiĝis unu el la vere gravaj problemoj de la internacia komunikado — la lingvoj. Dum la tuta semajno ni ĉiuj suferis pro la nefunkcianta traduksistemo aŭ manko de tradukistoj aŭ pro la nekomprenebla prononcado de la partoprenantoj, kiuj ofte kompreneble ne bone parolas la pontlingvojn... Mallonge dirite: evidente mankis la facileco de la uzo de Esperanto! Kaj pluraj ID-anoj palpebrumis unu al alia, ofte, pensante pri la facileco kiun ni konas ene de ID. □

# Neologismoj

de K. Kalocsay kaj G. Waringhien

Neologismo estas nomata ĉiu vorto neoficiala, ĝis sia oficialiĝo. Konforme al la libera evoluo de Esperanto, neologismon povas enkonduki ĉiu esperantisto; pri la prospero de la nova vorto decidas la esperantistaro, per ekuzo aŭ per ignoro.

Rilate al la neologismoj kolizias du vidpunktoj inter si kontraŭaj: tiu de la simpleco kaj facileco kaj tiu de riĉeco kaj literatura taŭgeco de la lingvo. La kolizio ŝajnas nerepacigebla, ĉar nek la propagando povas rezigni pri la granda altirforto de la facilco kaj simpleco, nek la literaturo pri la esprimforto kaj vortriĉo, sen kiuj vera literaturo, transdonanta ne nur la nudan penson, sed ankaŭ delikatajn nuancojn, metaforajn vort-aplikojn, duonklarajn aludojn, estas kaj restas nur pia revo. La problemo ŝajnas solvebla nur per la apartigo de la “poeziaj vortoj”, t.e. vortoj uzataj nur en la arta literaturo. Ĉi tiujn vortojn oni devus klarigi fine de ĉiu libro, en listo. Krome, devus ĉesi la principa antipatio kontraŭ la poezia vortriĉo, per la rekono, ke literaturo kaj intencita vortmalriĉo estas konceptoj kontraŭdirantaj unu al la alia.

Zamenhof mem estis tre tolerema kontraŭ neologismoj, li avertis sole: “ne tro krude, ne tro multe per unu fojo”. Jen kelkaj citaĵoj de li: “mi havas nenion kontraŭ la enprenado de tiuj vortoj...”; “neologismoj...nenion ŝanĝante, nek rompante, prezentas por la lingvo nenian danĝeron”; “Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank’ al reguleco de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la

lingvo de tempo pli frua”; “Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacile ellernebla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la Esperanta vortfarado”.

La principoj, laŭ kiuj la alpreno de novaj vortoj okazas, estas la jenaj:

1. Eviti, ĉe ofte uzataj vortoj, pezajn vortkunmetojn (piedpremi: treti; falpuŝiĝi: stumbli; malsupreniri: descendi; vizaĝŝmiraĵo: ŝminko).

2. Distingi nuancojn (fali kaj sinki; jelpi kaj boji; langvoro kaj laco; sturmi kaj ataki).

3. Signi ideojn, esprimeblajn nur per pluraj vortoj (novalo: provizore ne kulturata plugtero; statisto: akcesora rolulo; kontempli: longe kaj medite rigardi; baŭmi: stariĝi sur la postaj piedoj).

4. Anstataŭigi, ĉe ofte uzataj vortoj, “mal”-kunmetojn (stulta\*: malsprita; kvereli\*: malpaci; efemera\*: maldauĝa; aflikti\*: malĝojigi; kompleksa: malsimpla; rara: malofta; trista: malgaja; dura: malmola; milda\*: malsovaĝa).

5. Simpligi pseŭdosufiksajn vortojn (situacio: situi\*; dekoracio: dekori; federacio: federii\*).

6. Krome, per la plivastiĝo de Esperanto, oni certe pli kaj pli sentos la neceson de familiaraj vortoj (kaputa: rompiĝinta, ruiniĝinta; fatraso: aĉajaro; trampo: ĉifona malzorgita ulo; paŭti: malkontente silentadi; mungi: nazpurigi).

En la teknika lingvo, estas utile, ke la ĉefaj nocioj estu esprimitaj per

primitivaj vortoj, por kiel eble plej komplete gardi la jam internacian vortotrezoron.


En la komuna lingvo, la demando estas iom alia. Ĉar la scienca precizeco tie ĉi ne estas plu bezonata, oni povas pli larĝe helpi la memoron per uzado de kunmetitaj vortoj; tio estas des pli aprobinda, ke multaj naciaj lingvoj vaste praktikas tiun rimedon. Oni povas do meti la principon, ke ĉiufoje, kiam en du el la ĉefaj eŭropaj lingvoj la koncerna ideo estas esprimata per

vortkunmeto, ankaŭ en Esperanto estas eble aŭ oportune provi la saman esprimmanieron.

K. Kalocsay: “Neologismo”, *Enciklopedio de Esperanto*. — Budapeŝt, 1979, p. 390-391. Mallongigita.

K. Kalocsay, G. Waringhien. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. — Rotterdama, 1980, p. 526. Fragmentoj.

[Teksto represita el *Vojaĝo en Esperantolando* de Boris Kolker, 2002.]

\*Nun jam oficialaj vortoj. — 



## *Skribas la Legantoj*



### Skribas Marcel Leereveld:

*Responde al kelkaj kritiketoj*


Donald Rogers (*ELK* 58) pravas pri la malbona stilo de “Mia frato riparos la aŭton jaŭdon”; eĉ Zamenhof plurfoje verkis tiajn nebonajn frazojn, el kiaj “Tio alkondukis min ĉi tie la duan fojon”. Sed Donald ne forgesu, ke miaj kelkaj nebonstilaj frazoj celas klarvidigi certajn gramatikaĵojn, kiel ĉi tie.

Pli zorgigaj kaj timetigaj estas liaj ideoj pri ne/transitiveco de verboj, kvankam li evidente lernis ilin el aliaj gramatikistoj (ink. Zamenhof). Unuflanke li kaj aliaj deziras simpligi la gramatikon (ne forgesu: por anglo-lingvanoj, kiuj ja malfacile sentas la pasivon), sekvante la eraran Zamenhofaĵon “vi povas libere ĉiam fari pasivon”. Aliflanke li plendas pri simpligo je<sup>1</sup> la gramatikaj klarigoj (“estas tro simpligitaj” kaj “priskribi la gramatikon per konsekvenca modelo [= sen

escepto. — M.L.] kaj “La problemo estas klarigi la reston”).

Nu, oni ne povas havi ambaŭ: simplecon kaj neregulecon. Sekve la konsiloj de Zamenhof (pri pasiva uzo de netransitivaj verboj), kaj de Hopper & Thompson signifas ne akcepti striktajn regulojn senesceptajn. Tio ne gravas por la angla lingvo, kiun oni ne lernas per gramatikaj reguloj. Sed aliaj lingvoj, necese aŭ ne, emas obei tiajn regulojn, kaj ne konas formojn el kiaj “multe irata strato”. Kaj certe Esperanto ne povas permesi al si tiel liberigi siajn necese striktajn regulojn, precipe pro tio, ke ĝia celo estas multe pli vasta kaj malfacile akirebla ol la celo de la angla k.t.p., kiuj servas nur personojn elnaskiĝe ilin parolantajn.

Esperanto kontraŭe devas ĝuste komprenati de personoj parolantaj diversajn kaj ofte tre malsamajn lingvojn. Ĝia neceso esti malpli neperfekta en sia gramatiko ol etnaj lingvoj do estas giganta tasko, bonege farita de Za-

1. Marcel skribis ĉi tie: *ante...* — 

menhof. Sed ĉiu persono faras erarojn, kaj certe Zamenhof pro la giganteco de la tasko. Li mem sciis tion, ĉar li oftete ŝanĝis sian opinion, ekz. 1) la dusenca “kun” ne kontentigis lin, do li kreis “kune kun”, kaj poste ree forlasis tion; 2) Li ŝanĝis plurajn erarajn germanismojn, ekz. *elrigardi* al *aspekti*. 3) Li provis krei alternativojn por multaj mal-vortoj, kvankam ne tre sukcese; 4) Li ŝanĝis sian “ĉevalviro” al “virĉevalo” k.t.p. 5) Li ŝanĝis sian “mi daŭrigis labori” al “mi daŭris labori”; 6) Li unue kaj ĝuste konsideris “-at-” kiel nuran puran sufikson por la pasivo, sed poste konsideris “-it-” kaj “-ot-” kune kun “-at-” aspektsignifaj. 7) Komence li favoris Esperantigon de propraj nomoj, sed poste li ŝanĝis sian opinion pri tio. 8) Kreinte “-ist-” li malĝuste kreis (oni ne akceptis) sufikson “-st-”; k.t.p.

Nature li faris ankaŭ erarojn (precipe miskomprenojn), kiujn ne li mem, sed postaj Esperantistoj trovis kaj korektis. La Esperantistoj ne samopiniis samkvante pri ĉiu el liaj eraroj, sed jen estas kelkaj (el trideko listigita): 1) Li ne kreis oficiale (kvankam ebligis al ni krei ĝin) specialan sufikson por la pasivo (kiel por la medialo kaj por la faktitivo); 2) Li estus devinta krei pseŭdosufikson anstataŭ la prefikso *mal-*; 3) Pluraj vortoj gramatikgravaj havas du malsamajn signifojn (aŭ pli): *de*, *-iĝ-*, *dis-*, *re-*, *ek-*, *al*, *krom*, *manĝigi*, k.t.p.; 4) Li kreis plurajn esceptojn al siaj reguloj: *neniigi* kvankam *ĉiofaranto*, *sinofero* kvankam *domaĉeto*; *unu* por *iuj/certaj*; *miliono* por *milion*; *po tri* anstataŭ *tripoa/e*; *por veni* sed ne *pri veni*; *fumi cigaron* kaj *la cigaro fumas*; *dank’ al* kontraŭ *prefere al*; k.t.p., k.t.p. 5) La predikativo rilatanta al infinitivo kaj al propozicio devus

esti adjektivo (aŭ finaĵo *eŭ*), ne adverbo (Zamenhof kelkfoje faras tion kontraŭ sia regulo). 6) La malĝusta (ĉar kontraŭsignifa) uzo de “*peri*” kaj “*peranto*”; 7) La manko de speciala sufikso por la orda numeralo (rezultanta en “*triaetaĝa*”); 8) La manko de fina aspekto; 9) Lia kelkfoje nekonsekvenca uzo de la refleksivo; 10) Liaj pluraj kontraŭdiroj por kaj kontraŭlogikeco en gramatiko.

Nu, Donald Rogers evidente agas simile, en sia mallonga “klarigo”. Unue, li konsciis, ke la strikteco de la gramatikaj reguloj, kaj la evito de esceptoj, ne estas pro plezuro aŭ gusto, sed celas eviti miskomprenojn inter parolantoj de diversaj lingvoj.

Aŭ nia gramatiko agnoskas dividon inter transitivaj kaj netransitivaj verboj, kiel en plej multaj eŭropaj lingvoj, kaj konsekvencon, senesceptan, regulon ke nur, kaj ĉiuj, transitivaj verboj povas havi objekton kaj pasivon, aŭ ĝi agnoskas kompletan mankon de ĉi tiu divido. En la lasta kazo la lingvo bezonas ŝanĝon (kio facile eblos), ĉar Zamenhof kreis la unuan regulon, dividon inter verboj, kaj objektojn, kaj pasivon kaj, depende de tio, medialon. En la unua kazo oni (kaj Donald) sentile malsimpligas la aferon parolante pri forta kaj malforta (kaj intera) transitiveco de verboj, kaj eĉ enkondukante esceptojn kiaj “irita” strato: kaj “loĝata domo”. Donald sklave kaj senkritike akceptas la kelkajn erarojn (kontraŭdirojn) de Zamenhof (tamen la eraro de Zamenhof ĉi tie koncernas pli la klarigon ol la formon), dum eĉ *P..A.G.* saĝe opinias (pri alia eraro): “Ni devas insiste averti kontraŭ ili [= la eraroj], ĉar ili en Esperanton kontrabandas fremdan principon, kiu povas submini la bazon de la vortsiste-

mo... Se oni allasus ankaŭ alian vortefikon..., ĉio ĉi estus en danĝero, la tuta konstruaĵo [= Esperanto] ekŝanceliĝus, ĉio fariĝus malcerta kaj malfirma.” Sed post tio *P.A.G.* malsaĝe aldonas: “Ni ne deziras, tamen, ekstermi el la lingvo la pli-malpli familiariĝintajn kunmetojn de tiu speco, nur teni ilin inter la kadroj de ilia escepteco.” (§423) *Bonŝance*, en la kazo de netransitivaj verboj en la pasivo ni eĉ ne bezonas konsideri la *Zamenhof*’ajn erarojn esceptoj, ĉar li mem kreis la *Regulon pri Neceso kaj Sufiĉo*<sup>1</sup>, kiu klarigas al ni ke “irata vojo” k.t.p. ne estas esceptoj, sed mallongigoj laŭ tiu *Regulo*. Tio solvas la tutan aferon, simpligas la klarigadon, kaj evitas la *Rogers*’ajn esceptojn.

Kompreneble *Hopper & Thompson* ne malŝatas la esceptadon kaj la malsimpligan dividon inter gradoj de transitiveco, ĉar ili ja parolas pri kaj pro la lingvo angla (kaj iomete nur pri la aliaj lingvoj ĝermanaj), en kiu malsimpleco kaj esceptado ne faras la lingvon nefidinda *por elnaskiĝaj angloparolantoj*. (Ilia studo do ne valoras al Esperanto, kiu devas esti inter-nacie fidinda.)

*Donald* deziras “konsekvencan” modelon por la gramatiko, kaj mi certas, ke li tre kapablas mem formulitan, se nur li akceptus, ke eĉ *Zamenhof* faris kelkajn erarojn. Kaj krome, se li vidus la diferencon inter “(sur)iri straton” kaj la *nature logika* kazo (*ne* escepto) de la “interna objekto” (= cognate object): *dormi profundan dormon*.

Se oni deziras “konsekvencmodele” plisimpligi la klarigon (kion ĝis nun neniu ankoraŭ faris), oni rajtas eĉ

konsideri ĉiujn tiajn ŝajnajn esceptojn (*irata vojo*, *dormita dormo*, k.t.p.) kiel mallongigojn de je-verboj (*iri je vojo*; *dormi je dormo*), ĉe kiuj oni en la aktivo ĝenerale uzas la akuzativon anstataŭ la prepozicion (je), kaj en la pasivo neniam uzas la (kaŝitan) prepozicion (*jeiri vojon*, *jedormi dormon*), ĉar ĉiam klaras ke ĉe mediala uzo de netransitiva verbo (*sidiĝi*, k.t.p.) nature temas pri forlaso de la transitiviga sufikso *-ig-* (*sidiĝiĝi* = *sidiĝi*). Kaj same kiel ĉe participa substantivo (*falinto*) ĉiam temas pri persono pro ellaso de *-ul*. Kaj same kiel ĉe la pasivo la sufikso *-ati* (*ĝi konstruatis*, *-as*, *-os*) ĉiam temas nur pri pasivo, ne pri aspekto aŭ tempo.

#### Postnoto:

##### *Klarigeto*

Legantoj de miaj *ĈN*-artikoloj eble trovas min nekonsekvencan, ĉar en ili miaj landnomoj aperas per la sufikso *-i-*: *Francio*, *Britio*, k.t.p. dum en aliaj publikigaĵoj miaj mi ĉiam uzas kaj konsilas la originan kaj *Zamenhof*’an sufikson *-uj-*: *Francujo*, *Britujo*, k.t.p. Ili sciu, ke la kaŭzo estas, ke nia estimata redaktisto ĉiam ŝanĝas miajn *-ujo-*’jn al *-io-*’j, laŭ sia filozofio, ke ĉiuj artikoloj en gazeto devas havi unuforman stilon. □



## POR RIDIGI VIN



Tri virinoj promenadas en nudista plaĝo kaj ekvidas ulon kiu kovras sian kapon kaj talion per du ĵurnaloj.

Aliras lin unu el la virinoj, kaj levinte la duan ĵurnalon diras:

“Li ne estas mia edzo”.

Iras tien la dua:

“Jes, li vere ne estas via edzo.”

Levas la ĵurnalon la tria:

“Li eĉ ne devenas el nia urbo...”

[El *Naturista vivo*, numero 66, 2002]

1. Kutime oni atribuas tiun *regulon* al *René de Saussure*. — [db]

## Ruth Tumman

11-04-1919 — 20-06-2002

nekrologas Marcel Leereveld

Ruth Tumman, esperantisto de multaj jaroj, havis ŝatindan karakteron, kiu radiadis la amon kaj pacon kaj respekton inter la homoj, kaj la lertecon rekte kaj detale aranĝi siajn laborojn. Esperanto do tre konvenis al ŝi, pro sia logika praktiko kaj samtempe sia celo pliharmoniigi la interhomajn rilatojn.

Juna Ruth kreskis en la okcidenta kamparregiono de Viktorio. Jam en junaĝo ŝin ĝenis la interhomaj malpaco kaj malegaleco, sed estis en Melburno ke ŝi aktive helpis helporganizaĵojn. Krom al Esperanto, ŝi donis multan helpon al Asocio por Unuiĝintaj Nacioj, laborante por ĝi ofte en ĝia oficejo kaj ofte hejme. En ĉiu sia laboro ŝi havis la daŭrajn helpon kaj sam-sentecon de Gerald, sia amata edzo kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj. Dum Gerald laboris por la samaj idealoj (U.N.A. kaj Esperanto) pli emocie kaj pli publike, Ruth praktikis kalman, certan, kaj klaran labormetodon kaj modeste donis valoran kaj detaleman kontribuadon.

Kiel esperantisto Ruth estis origine lernanto kaj membro de Melburna Esperanto-Asocio, en kiu tiutempe tre aktivis Fay kaj Herbert Koppel kaj Errol Chick. Post kelkaj jaroj ŝi fondis apartan Esperanto-klubon en C.A.E., kies posttagmezajn kunvenojn pluraj lernantoj trovis pli taŭgaj por vizitadi. Tiu klubo ankoraŭ daŭras, nun precipe per la organizado de Franciska Toubale kaj Bernie Heinze.

Ni bone memoras la grandan helpon, kiun Ruth donis al multaj Esperanto-aktivecoj, inter aliaj al la organizado de la A.E.A.-kongreso en Melburno en 1990, kies okazigon iniciatis ŝi, kaj kies sukceson kreis parte ŝiaj praktikemo kaj entuziasmo.

Post la morto de Gerald ŝin afliktis kancero, kvankam ĝis la fino ŝi aktivis kiom eblas.

Ni perdis en ŝi ĉiam helpeman, inteligentan, kaj tre afablan kunlaboranton, kaj ni kondolencas al ŝiaj samfamilianoj. Pluraj esperantistoj ĉeestis la funebran ceremonion. □

## Dudley Parkinson

Kvankam jam aperis kondolenco pri la morto de nia tasmania membro Dudley Parkinson, mi pensas ke la ĉi suba priskribo de lia vasta laboro interesos la sciencistojn inter niaj membroj kaj eble ankaŭ aliajn A.E.A.-anojn. Mi tradukis la eltiraĵon el la tasmanio-universitata gazeto *Alumni*:

Dudley W. Parkinson naskiĝis en Perth. Li studis matematikon ĉe University of Western Australia, kaj kompletigis sian doktorecon en

plasma fiziko ĉe John Hopkins University en Baltimore (Usono). Post tio li faris postdoktorecan laboron ĉe Fordham University en Novjorko kun Victor Hess (nobelpremia gajnto pro la malkovro de kosma radiado).

Dudley retroiris al Aŭstralio kaj laboris por la Bureau of Mineral Resources (nun AGSO-Geoscience Australia), unue en Melburno kaj poste en Kanbero, antaŭ ol eniĝi en la Geo-



logian Departementon de University of Tasmania, respondeca pri la disvolvigo de instruado kaj scienca ekzamenado pri geofiziko. Li emeritiĝis en 1984.

Lia propra intereskampo estis teraj elektro kaj magnetismo. Antaŭ ol eniĝi la Universitaton li laboris pri la proprecoj de helioma gaso en eligtuboj, pri la malkovro de radiaktiva elfalo (oni malpermesis al li publikigi la rezultojn de tiu ekzamenado), pri sia pionira laboro en ekzamenado de atmosferaj radiometriko kaj magnetismo por trovi mineralsituojn, kaj li produktis la unuajn aŭstraliajn diagramojn ĉiomajn pri magnetaj kampoj. Poste li ellaboris la globan desegnon de la taga variado de la magneta kampo de Tero, kaj faris laboratoriajn eksperimentojn por similumi la efikojn de elektromagneta induktado en Tero. Li famiĝis pro sia disvolvo de la "Parkinson-vektora" maniero analizi la strukturon de la elektra konduktiveco de la tera surfaco, kaj pro sia klera studo *Introduction to Geomagnetism* (1983).

W. Dudley Parkinson estis bonega sciencisto, sukcesplena instruisto, valora kolego, kaj ĉarma viro. Homo de diversaj interesoj kaj rimarkinda modesteco, multe mankonta al tiuj kiuj gajnis pro liaj ŝago, inteligento, kaj amikeco.

[Tr. Marcel Leereveld]. □



## POR RIDIGI VIN



Dum ŝi laboris en la kuirejo la patrino aŭskultis sian 5-jaran fileton, kiu ludis en la salono per sia nova elektra trajno. Haltis la trajno, kaj ŝi aŭdis la

filon diri:

"Ĉiuj vi kanajloj kiuj volas elvagoniĝi, eliru nun, ĉar tiu ĉi estas la lasta haltejo! Kaj ĉiuj vi kanajloj kiuj volas envagoniĝi, enmetu rapide viajn postaĵojn sur la sidlokojn, ĉar ni tuj foriros."

La ŝokita patrino eniris la salonon kaj diris al sia filo... "Ni ne uzas tian lingvaĵaĉon en nia domo. Nun vi iru en vian ĉambron kaj vi restu tie du horojn. Post du horoj vi rajtos eliri kaj ludi per via trajno, sed mi deziras ke vi uzu multe pli belan lingvaĵon."

Du horojn poste la fileto eliris el sia ĉambro kaj rekomencis la ludadon per sia trajno.

Baldaŭ poste la trajno haltis, kaj la patrino aŭdis: "Jen grava mesaĝo al ĉiuj elirontaj pasaĝeroj, bonvolu ne forgesi kunporti ĉiujn viajn posedaĵojn. Ni dankas vin, ĉar vi veturis kun ni hodiaŭ, esperante ke via veturo estis eĉ tre granda plezuro."

Kun plezuro ŝi aŭdas ankoraŭ ion pli... "Por tiuj el vi, kiuj estas enirontaj la trajnon, ni petas ke vi metu viajn pakaĵojn sub la sidlokojn. Ne forgesu ke oni ne rajtas fumi en la trajno. Ni esperegas ke via veturo kun ni estos plezura kaj bonega."

La patrino ekridetis, sed tiam la fileto aldonis: "Tiu el vi kiuj estas elrevigitaj pro la duhora malfruiĝo, bonvolu konsulti la dikan virinon en la kuirejo."

[el *Tamen Plu*]

Terapiiston konsultis edzino dirante: "Mi havas problemon. Ĉiam, kiam ni estas en la lito, kaj mia edzo orgasmas, li eligas oreľfrapan kriegon."

"Tio estas tre natura", asertis la kuracistino. "Kio estas la problemoj?"

"La problemoj estas" pluplendis la edzino, "ke mi vekiĝas." [el *Tamen Plu*]

## Multaj vortoj!

Ensume, niaj konkursantoj trovis proksimume 139<sup>1</sup> vortojn fareblajn el la literoj *e i ĝ k o r s t u* kun la principo ke ĉiu vorto enhavu la literon *i*, neniu litero estu ripetita interne de vorto, neniu radiko estu uzita pli ol unufoje, kaj ĉiu vorto estu kompleta:

ekio, eki (ekiro / ekiros / ekiru / ektusi), ek-si, ekstri, eriko, eroti, erotike (erotiko / erotiku), eskorti, esti, estri, etike / etiko / etiku), ĝesti, ĝi (ĝio), ĝire (ĝiro / ĝiru), ĝis (ĝise / ĝiso / ĝisu), ĝui (ĝuis), ĝusti, ie, ies, iĝo (iĝe, iĝu), ikso, iktero, ikto, ile, io, ire (iro / iru), isto, kisto, Kito, kiu, koitu (koitus), korusi, kosti, koti, krei (kreito), kreti, krie (krio / kriuo), kriste (Kristo), krusti (krustiĝo / krustiĝe / krustiĝu), kruti (krutiĝos), kuire (kuiro), kureti, kuri (kuristo), kurio, kursi, kurti, oestri, oki, okri, oksiore, ori, orti, osti, rekti (rektiĝu), resti, reti, Retio, reĝi (reĝis), riske (risiko / risku), rito (rite), rosi, rosti, ruki, rukti, Rusio, rusti (rustiĝe / rustiĝo), rustike (rustiko), ruĝi, ruti, seĝi, sei, seki (sekiĝos), sekuri, seri,

serio, si (sio), sieĝo, siko, Siksto, siro, siroke, sito, situo, Siuo, sketi, skio, skiro, skui (skuiĝe / skuiĝo), skurgi, skuti, sorike, sorite, sterki, stiko, stire (stiro / stiru), stoike, stoki, streki, striko, strio, stuki, suito, sukuri, suki, suri, teksu, teoriu, tie, ties, tiko, tineo, tino, tinuso, tio, tire (tiro / tiru), tireo, Tiro, Tiso, tiu, Tokie, toksi, torei, trei, tri (trio), triku (triksiĝo), troi, trokei, trui, truki, trusi, turi (turis), Turkio, turkiso, tusi, urĝi, urio, ursi, urtiko, Utiko.

La konkurso ankaŭ postulis almenaŭ unu naŭ-literan vorton. 19 tiaj vortoj estis proponitaj (la plejparton el ili proponis Marcel Leereveld, kiu ankaŭ kontrolis la tutan liston kaj proponis pliajn vortojn ĝis tiam ne rimarkitajn):

ekirĝusto, ekostriĝu, ekrestigi, ekstroigi, ektruigi, eskortiĝu, kiseturĝo, kisurĝeto, kisurĝeto, kreogusti, ostkreiĝu, reskotiĝu, restukiĝo, ruĝkiseto surkotiĝe, terskuiĝo, trosekiĝu, urĝetkiso, urĝkiseto.

<sup>1</sup> “Proksimume” ĉar kelkaj vortoj en la listo (ekz.: iĝu, skuiĝe, skuiĝo) nebligas la ĉeston de aliaj radikoj, pro ripeto.) □



## Interrete



- **Redadreso de via redaktoro:** Mesaĝoj por *ESK*: bonvolu uzi la adreson: **sudakruco@sudakruco.org**  
La persona retadreso de via redaktoro estas nova: **donbroadribb@westnet.com.au**  
*Nepre atentu ke la persona adreso “donalbroadribb@mac.com” ne plu validas!*
- **La Virtuala Esperanto-Biblioteko** (<http://www.esperanto.net/veb/index.html>) finfine estas ĝisdatigita,

kaj legeblas per unikodo, (aŭ, laŭprefere, per la x- aŭ h-sistemo). Ni varme rekomendas viziti ĝin por trovi viajn Esperanto-bezonojn.

- **Macintosh OS X Esperanto-vortaro:** nun ekzistas esperanta vortaro por utiligo kun OS X-programoj (Mail, OmniWeb, kc.). Ĝi estas senpage elŝutebla kun la senpaga programo *cocoAspell 1.3* por Macintosh OS X. La senpage haveblaj programoj elŝuteblas ĉe: <http://www-ciir.cs.umass.edu/~leouski/>

cocoa spell/

(Kune, la programo kaj la vortaro sumiĝas al 8,1 megabajtoj.)

• **Ni provis por Macintosh-istoj la tekstoprogramon PEPPER:** PEPPER estas programo per kiu oni povas verki leterojn, simplajn manuskriptojn, kc. Ĝi bone kapablas uzi Unikodon, do facile skribas esperante. Krome, por spertuloj, ĝi havas specialan makrosistemon, kiun ĝi nomas “accelerator”, per kiu oni povas enmeti ŝablonajn tekstojn laŭdezire; kaj ankaŭ eblas ligi klavojn al menufunkcioj laŭvole. La Macintosh-versio de PEPPER uzas la normalan OS X-unikodigan sistemon.

Ankaŭ ekzistas Windows-versio, per kiu eblas enmeti la esperantajn literojn per utiligo de insert-tabelo (krome eblas, per iom da zorga kaj iom kompleksa manipulado, programigi klavojn por aŭtomate fari la esperantajn literojn.) Sed Windows-istoj trovos iun el la senpagaj programoj ĉisube diskutataj multe pli kontentigaj.)

La programo estas tre stabila kaj tre bone funkcias. Ĝi estas komerca varo; oni povas elŝuti ĝin senpage ĉe [www.hekkelman.com](http://www.hekkelman.com), por provi ĝin. Ankaŭ eblas uzadi la Macintosh-version sen pago. Se oni decidas aĉeti ĝin, la prezo estas relative malalta. Mi varme rekomendas ĝin al Macintosh-istoj por ordinera ĉiutaga uzado. [d]

• **Por Windows-uzantoj ni provis kvar senpagajn tekstoprogramojn:**

**602 PC Suite:** Ĉi tio estas grupo de programoj, iom simila al tiu de Microsoft Office, sed tute senpaga. Se oni (senpage) ankaŭ registras la programgrupon, ĝi ankaŭ ebligas prilabori bil-

dojn kaj fotojn (simile al la multekosta PHOTOSHOP), konservi fotojn en virtuala albumo, kc. 602 TEXT estas riece provizita per ĉio necesa. ankaŭ e-poŝto eblas per tiu sama programo. Dokumentoj faritaj per MS Word estas legeblaj ankaŭ per ĉi tiu programo, kaj oni povas ankaŭ pretigi per ĝi dokumentojn legeblajn per MS Word. La tuto ampleksas 13,8 megabajtojn, kaj estas elŝutebla ĉe:

<http://www.software602.com/products/pcs/>

**OpenOffice** estas ankaŭ senpaga, plene programaro rivalanta tiun de Microsoft. Ĝi ampleksas 49 megabajtojn, kaj estas plej facile trovebla per [www.versiontracker.com](http://www.versiontracker.com), ĉar la retpaĝoj de OpenOffice.org estas tre malfacile navigeblaj.

La tekst-programo de OpenOffice estas tre simila al tiu de 602 PC Suite, kaj ebligas ĉian tekstoprilaboron facile kaj klare. Ankaŭ ĝi legas kaj pretigas dokumentojn kongruajn kun tiuj de MS Word.

**Atlantis Nova** estas multe malpli granda (1-megabajta) programo, kiu ebligas normalan tekstoprilaboradon, kaj estas nekutime kompleta laborilo; ĝi tamen ne ebligas piednotojn, kaj aliajn tiajn porpres-utilaĵojn (malsimile al 602 Text kaj OpenOffice, kiuj havas ĉiajn kapablojn.) Ĝi elŝuteblas ĉe la adreso <http://www.rssol.com/en/>, kaj estas tute senpaga.

**Jarte** estas ankaŭ tute nova senkosta tekstoprogramo, ampleksanta 1,6 megabajtojn. Ĝia aspekto estas tre neordinara: koloroplenegaj ikonoj kaj menuoj iom nekutime aranĝitaj necesigas iom da tempo por alkitimiĝi, sed ankaŭ estas tre helpaj. Ĝi estas bona por leterverkado, notoj, kc., sed mankas en ĝi pluraj el la funkcioj kutimaj

en tiaj programoj. Facilas elŝuti ĝin pere de [www.versiontracker.com](http://www.versiontracker.com).

Ĉiuj ĉi programoj facile ebligas esperantoligvan tajpadon, se oni kune utiligas la ĉisekvan:

- **ESPTYPE estas utilega senpaga programo por Windows:** instalinte ĝin, vi povas facile uzi la esperantajn literojn en preskaŭ kiu ajn Windows-programo. Krome, vi povas elŝuti preskaŭ 200 esperanto-unikodajn tiparojn kun ĝi. La programo ebligas taji la esperantajn literojn tiel ke cx

aŭtomate aperas surekrane kiel ĉ, Gx kiel Ĝ, kc. Ni provis ĝin kun la senpagaj ĉisupre recenzitaj programoj OPENOFFICE kaj 602 SUITE, kiel ankaŭ kun MS WORD, kaj diversaj aliaj, kaj senĝene uzis ĝin. Ĝi rapide funkcias, kaj tute faciligas la esperantajn literojn en e-poŝt-programoj, kc. Ĝi senpage haveblas ĉe [www.ran-domly.com/](http://www.ran-domly.com/) (ĉe tiu adreso musumu sur "other programs" por transiri al la ESPTYPE-elŝutejo). — [d]



## El la Regionoj



N.S.W.: Nova Novkastela Grupo: Rekomenci la klubon estis la plej malfacila afero, ĉar mi sciis ke devas esti esperantistoj en Novkastelo, sed necesis trovi ilin! La unua esperantisto kiun mi trovis estis Robert Thomson. Li vidis mian nomon ĉe TTT-ejo por esperantistoj kiuj volas havi plumamikon, kaj rimarkis ke mi estas novkastelano. Mi babilis kun li longtempe antaŭ ol mi starigis la asocion. Kiam mi parolis kun li pri restarigo de asocio, li tuj membriĝis. Bedaŭrinde li ne estas en Novkastelo dum la plejparto de la jaro. Mi trovis Matt Maguire-on nur per ŝanco, je la soc.culture.esperanto. Mi rimarkis ke li havas aŭstralian retpoŝtadreson, kaj mi kontaktis lin. Li donis kelkajn retpoŝtadresojn de la membroj de la manlia klubo al mi, kaj mi skribis al ili, demandante ĉu ili scias kiel kontakti novkastelajn esperantistojn. Terry Manley respondis al mia demando. Li skribis pri novkastela esperantisto Andrew Spannenberg. Mi telefonis al

Andrew, kaj li donis sian retadreson al mi, kaj membriĝis en la asocio.

Antaŭ tiam, mia muzikinstruisto membriĝis la Asocion; li ne scipovis paroli Esperanton, sed li volis lerni. Tiel ni havis kvar membrojn en majo. Mi verkis nian unuan novaĵleteron. Andrew demandis al mi ĉu ni volos havi informtablon ĉe la kultura Stomp-festo, kaj mi akceptis la proponon. Kiam ĉi tiu okazis, mia lernejamiko interesiĝis pri Esperanto, kaj li membriĝis en la klubo, kaj venis al Stomp. Ĉe Stomp, ni informis homojn pri nia grupo. Nia grupo nun havas 6 membrojn (kvankam nur 3 parolas Esperanton bone). Je la 12a de oktobro ni havos Esperanto-kursaron. Ni renkontiĝas la unuan sabaton de ĉiu monato.

Raportis Jonathan Moylan  
[jonathan@eepjm.newcastle.edu.au](mailto:jonathan@eepjm.newcastle.edu.au)  
[http://www.esperanto.org.au/newcas-](http://www.esperanto.org.au/newcastle.html)  
[tle.html](http://www.esperanto.org.au/newcastle.html)

[El *Tamen plu* aŭgusto 2002]

W.A.: La 29an de junio, Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio malluis

sian oficejon en Claisebrook Lotteries House, kaj do ne plu havas propran “domon”. La nova telefonnumero por ELOA estas tiu de la sekretario, Maureen McSweeney: (08) 9221 3250.

Ni multe bedaŭras anonci la morton de Christopher Dean, malfrue en julio. Ni esperas aperigi nekrologon en nia venonta numero.



## POR RIDIGI VIN



### Instrukcioj por glutigi pilolon al via kato

1. Kuŝigu la katon sur vian maldekstran brakon kvazaŭ bebon. Loku la montrofingron kaj la polekson sur unu kaj alia flankoj de la buŝo de la kato. Milde premu por ke li malfermu la buŝon. Sukcesinte pri tio, tuj metu la pilolon en lian buŝon. Permesu ke la kato fermu la buŝon kaj englutu la kuracan buleton.
2. Prenu la pilolon de sur la planko kaj la katon de malantaŭ la sofo. Loku la katon sur vian maldekstran brakon kaj ripetu la proceduron.
3. Prenu la katon el la dormoĉambro kaj forĵetu la duonfandiĝintan boluseton.
4. Prenu novan pilolon, metu la katon sur vian maldekstran brakon kaj ĉirkaŭpremu liajn malantaŭajn krurojn per via dekstra mano. Igu lin malfermi la buŝon kaj puŝu la pilolon ĝisfunde per la montrofingro. Fermu vian buŝon tuj kaj nombru ĝis dek antaŭ ol lin forlasi.
5. Rapidu preni la pilolon el la akvario kaj la katon de sur la vestoŝranko. Petu la helpon de via edz(in)o.
6. Genuiĝu surplanken kun la kato firme kaptita inter viaj genuoj, retenante liajn kvar krurojn. Ignoru la grumbladon de la kato. Petu vian edz(in)on forte senmovigi lian kapon dum vi malfermas la buŝon. Metu lignan spatelon tiel funde kiel eblas. Glitigu la pilolon sur la spatelo en la gorĝon de la kato.
7. Prenu la katon de sur la kurtenrelujo kaj ankaŭ novan pilolon. Memoru aĉeti

novan spatelon kaj fliki la kurtenon. Zorge volvu la katon en viŝtukon tiel ke nur lia kapo restas ekstere. Petu la edz(in)on teni lin tiel. Dissolvu la granulon en iom da akvo, malfermu la katan buŝon helpe de kraĵono kaj liveru la likvaĵon en lian buŝon.

8. Legu en la instrukcioj, ĉu la kuracilo estas damaĝa por homoj. Trinku iom da akvo por trankviliĝi. Almetu plastron al la brako de la edz(in)o kaj purigu la tapiŝon de sangogutoj per varmeta akvo kaj sapo.

9. Serĉu la katon ĉe la najbaro. Prenu novan medikamentaron. Metu la katon en la ŝrankon de la kuirejo kaj fermu la pordon, lasante lian kapon ekstere. Malfermu la buŝon helpe de desertokulero. Ĵetu la pilolon en la buŝon de la katĵo helpe de katapulteto.

10. Iru ĝis la garaĝo preni la ŝraŭbilon por refiksi la pordon al la ŝranko. Metu malvarman kompreson sur la gratvundojn de via vizaĝo kaj kontrou kiam laste vi ricevis kontraŭtetanosan vakcinon. Formetu vian ĉemizon kaj surprenu novan.

11. Voku la fajrestingistojn por preni la katon de sur la arbo transe de la strato. Senkulpiĝu ĉe via najbaro, kiu vundiĝis provante devojiĝi de la kato. Prenu la lastan pilolon el la flakono.

12. Ligu liajn antaŭajn krurojn per tolaĵŝnuro kaj fiksi la katon al kruro de la manĝotablo. Surmetu ĝardenistajn gantojn. Malfermu la buŝon de la kato per universala ŝraŭboŝlosileto. Metu la pilolon enen tuj sekvatan de peco da fileo. Gvidu lian buŝon supren kaj verŝu duonglason da akvo por helpi lin engluti.

13. Petu vian edz(in)on porti vin al la unuahelpejo plej proksima. Sidu trankvile dum la kuracisto kudras viajn fingrojn kaj brakojn kaj deprenas pilolerojn najlitajn en vian dekstran okulon. Revenante hejmen, haltu ĉe la unua meblovendejo kaj mendu novan manĝotablon

14. Serĉu veterinaron kaj petu lin pri hejma vizito!!!

## Odlo Bokserp: Liaj paĝoj

### La 1-a de aprilo je la 23a de septembro ĉijare.

*Laŭ decido de la Internacia Kobolda Asocio de Aŭstralio kaj Patagonio (IKAAP), kunveninta en la Hotelo Kontinenta sur Insulo Sankta Georgo (Bahamoj) pasintmonate, la Internacia Tago 1-a de aprilo okazos lunde la 23an de septembro.*

Diskutado antaŭ tiu decido estis tre vigla. La delegito de Andoro argumentis ke laŭ antaŭ longe decidita precedento, la 1-a de aprilo devus okazi je la 17-a de marto ĉijare. Koboldestro, prezidante la kunvenon, deklaris tiun proponon malvalida, ĉar la 17-a de marto jam okazis antaŭ pluraj semajnoj, do mankus sufiĉa tempo por prepari la ĉijaran 1-aprilan feston.

Krome, la delegito de Batavio asertis ke ĉar Andoro ne estas membro de la Internacia Kobold-Asocio de Aŭstalo kaj Pataginio, ĝi ne rajtas proponi oficialan daton.

La delegito de Andoro rebatis ke Batavio ne plu ekzistas, ĉar en 1949 ĝi ricevis novan nomon Ĵakarto, do neniu protesto el Batavio validas.

Sekvis nelonga mondmilito; post tio la deĵoristaro de Hotelo Kontinenco forviŝis la sangon kaj sekigis la plankon, kaj la delegitaro-minus-tri<sup>1</sup> unuvoĉe<sup>2</sup> akceptis la proponon de la afrika delegito Februaro, ke la festo okazu en septembro.

Konsultite, la delegito respondeca pri septembro informis ke spaco inter la 22a kaj 24a de septembro estas dis-

ponigebla por la 1-a de aprilo, ĉar ĉijare la Monato de la Mallonga Semajno ne okazos. Sekve, lundo estos remetebla en tiun semajnon, se dezirate.

La afrika delegitaro ankaŭ atentigis ke nur Februaro rajtas havi dudeknaŭtagan monaton, do se septembro arogas al si tiun privilegion, neceso okazigi Kvaran Mondmiliton, kaj tio konfliktus kun la kutima ripozmonato de Nordsudhemisteraj Koboldoj.

Tiumomente entrudis sin novulo, kiu erare kredis ke temas pri la bahama versio de Granda Frato, kaj ke li rajtas pligrandigi la nombron da personoj restantaj en la Domo. Sed kiam oni informis lin ke tiukaze li devos resti du ĝis kvin semajnojn, kaj verŝajne oni proponos lian eligon ĉiudimanĉe, li kuris en la Taglibroĉambron kaj fuĝis tra la sekreta pordejo al la ekstera mondo.

Ĉar la lasta tagero jam estis decidita, la Internacia Kobolda Asocio de Aŭstralio kaj Patagonio deklaris sian kunsidon finita.

Intertempe, oni informis min en ke la lastaj numeroj de *ENK* malabundis komposteraroj, kaj ke mia kunredakta helpo estas necesega por renovigi la intermondan reputacion de tiu prestiĝa revo. Do mi tuj aĉetis reirflugbileton por malforiri Aŭstralion. □

1. Dum la mondmilito, la delegito de neŭtra Svislando utiligis la oportunan trinki tason da kafo en la hotelbufedejo, kaj forgesis reveni al la konferenco.

2. Jam dormadis la aliaj 9 delegitoj.

**LA AŬSTRALIA KAJ LA  
NOV-ZELANDA  
ESPERANTO-ASOCIOJ**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

**Prezidanto:** *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); 📠 03 9905 3668 (BH).

[esperanto@education.monash.edu.au](mailto:esperanto@education.monash.edu.au)

**Vicprezidantoj:**

*Franciska Toubale*, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.

[franciska@bigpond.com](mailto:franciska@bigpond.com)

*Hazel Green*, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

[hazgreen@twmba.net](mailto:hazgreen@twmba.net)

**Sekretario:** *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268.

[abcetc@ozemail.com](mailto:abcetc@ozemail.com)

**Vicsekretario:** *Bob Felby*, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

[esperantobob@iprimus.com.au](mailto:esperantobob@iprimus.com.au)

**Kasisto:** *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

[Pitney@Cybernetint.net](mailto:Pitney@Cybernetint.net)

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

**Prezidanto:** *Bradley McDonald*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

☎ 09 579 4767, 📠 09 579 1070.

[neelam@voyager.co.nz](mailto:neelam@voyager.co.nz)

**Sekretario:** *Howard Gravatt*, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 626 6129. [hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

**Kasisto:** *Jackie Fox*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09-826 2081. [brianandjackie@abztrak.co.nz](mailto:brianandjackie@abztrak.co.nz)

**KOTIZOJ:**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

<http://www.esperanto.org.au/>

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familianoj] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

**Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco:** Por membroj, AŬ\$3 + poŝtendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtendkosto. Menu de la Libroservo de AEA.

**Abonoj ekster Aŭstralazio:** €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

**Artikoloj de aŭtoroj nomitaj** estas © 2002 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de Esperanto sub la Suda Kruco estas ©2002 de la Aŭstralia kaj la Nov-zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

**Ĉi tiu numero de EJK** estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac. La programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per iMac, uzante Acrobat-on.

**Specialaj kunlaborantoj:**

*Odlo Bokserp*, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T  
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisionistoj

*Vera Doloro*, L.M.K.

[lia multsuferanta kontrolanto]

Per tiu abonaĵo, Lando de Viro an kofitilo al tiu numero.